





Internacia Heliofizika Jaro



IHJ 2007

Progresigante Internacian Partoprenadon en Tutmondaj
Studoj de la Sun-Tera Sistemo per la Unuiĝintaj Nacioj





1957

La pasinteco: Internacia Geofizika Jaro (IGJ) 1957

En 1957, kun senprecedenta internacia kunlaborado, pli ol 60,000 sciencistoj kaj inĝenieroj de 67 nacioj ĉe miloj da esploradaj lokoj ĉirkaŭ la mondo partoprenis en la Internacia Geofizika Jaro (IGJ 1957).

La ĉefa celo de la Internacia Geofizika Jaro (IGJ) estis studi la tutmondajn fenomenojn de Tero kaj geospaco.

***IGJ: La komenco de kosma esplorado kaj la intereso de la Unuiĝintaj Nacioj por la kosmo** IGJ komencis per kosma esplorado kaj la lanĉo de Sputniko 1 en Oktobro 1957. Ĝi ankaŭ interesigis la Ĝeneralan Asembleon de la Unuiĝintaj Nacioj pri la kosmo, kaj kreis la Unuiĝintajn Naciajn Komitatojn pri la Pacemaj Uzoj de la Kosmo (UN-COPUOS) – la ĉefa komitato de la UN kiu traktas la uzon de la kosmo por pacemaj celoj.*



2007

La estonteco: Internacia Heliofizika Jaro (IHJ) 2007

En 2007, kvindek jaroj post IGJ, sciencistoj kaj inĝenieroj de ĉiuj 191 Membroj Ŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj partoprenos en kampanjo de internacie kunordigaj observadoj pri fundamentaj demandoj de Tera kaj kosmaj sciencoj.

La IHJ estos unikan okazon por kunordigi observadojn inter impona floto de internaciaj kosmaj misioj kaj dateno de terbazaj observatorioj. Oni akiros senprecedentajn, simultanajn observadojn de sunaj, heliosferaj, geosferaj, geospacaj, kaj atmosferaj fenomenoj. La dateno permesos tutmondajn studojn de la tuta heliofizika sistemo.

Kion signifas "heliofizika"? "Heliofizika" etendas la vorton "geofizika"; ĝi inkludas rilatojn inter la Tero, la Suno, kaj la interplaneda kosmo. La aferoj de IHJ 2007 daŭros la sukceson de IGJ 1957, daŭrante la tradicion de tutsistemaj studoj.

Celoj de IHJ 2007

La celo de IHJ 2007 estas malkovri la fizikajn meĥanismojn kiuj pelas la kupladon inter la Tera atmosfero kaj sunaj kaj heliosferaj fenomenoj. La sistema tutmonda studado de ĉi tiu interago estos la ĉefa temo de la IHJ. Pro tio, la celoj de IHJ estas:

- Plibonigi nian komprenon de la heliofizikaj procezoj kiuj regas la Sunon, Teron, kaj heliosferon
- Daŭrigi la tradicion de internacia esplorado dum la 50a datreveno de la Internacia Geofizika Jaro
- Montri al la mondo la belecon, rilatecon, kaj signifon de kosma kaj Tera scienco

Dateno de la IHJ estos havebla al scientistoj kaj inĝenieroj de ĉiuj nacioj, kaj ni komunikos la eksciton de la sciencaj rezultoj al la mondo per serio de novaĵ-aferoj kaj publikaj prelegoj.

Prezentante IHJ rezultojn al studentoj

Publika edukado ankaŭ estos grava parto de IHJ. La ĉefa celo estos certigi ke studentoj kaj la publiko sciiĝos pri la tutmonda kunlaborado kaj kunordigaj observadoj dum 2007 kaj poste, kaj ke ili sciiĝos pri ĝia efiko sur scienca esplorado.

La IHJ organizos vizitojn de IHJ scientistoj al klasoĉambroj ĉirkaŭ la mondo, kaj permesos ke studentoj aktive partopreni en IHJ esplorado. Ĝi ankaŭ organizos elmontraĵojn ĉe lokaj muzeoj kaj aliaj lokoj, kaj dissendos la novaĵon kaj eksciton de IHJ esplorado per publikaj prelegoj, eldonaĵoj, kaj intervjuoj kun televido kaj aliaj komunikiloj.

Partoprenado en IHJ

La Unuiĝintaj Naciaj Fako por Kosmaj Aferoj, per la Unuiĝintaj Naciaj Baza Kosma Scienca Iniciato (UNBSSI), helpas sciencistojn kaj inĝenierojn de la tuta mondo partopreni en IHJ 2007. Ĝi uzos preskaŭ 15 jarojn da kunsidoj pri baza kosma scienco por sciencistoj kaj inĝenieroj de evoluantaj nacioj.




UNBSSI koncentros ĝiajn 2005-2008 aferojn sur la planado de IHJ partoprenado de evoluantaj nacioj. Kunlaborante kun la IHJ Sekretariejo, la UNBSSI koncentros sur iniciatoj kiuj stimulas Kosmajn kaj Terajn sciencajn aferojn en evoluantaj nacioj – ekzemple la kreado de malmultekostaj ter-bazaj instrumentaroj por tutmondaj studoj en kosma scienco.

Se vi interesiĝas pri stimolante kosmajn sciencajn aferojn ĉe via universitato aŭ instituto, bonvolu kontakti nin ĉe ihy_unbss@ihy.gsfc.nasa.gov kaj notu viajn interesojn en la Datenbazon por IHJ Scienca Kunordigo.

IHJ ankaŭ serĉas Precipajn Esploristojn (PE-ojn) por la kunlabora programo kiu faciligos kunlaborado inter PE-oj kaj institutoj en evoluantaj nacioj por konstrui ter-bazajn instrumentojn.

Se vi havas eksperimenton aŭ planon por ter-baza instrumento aŭ observatorio, kaj vi kredas ke oni povas fari novan kaj ekscitan kosman sciencon per la kreado de novaj internaciaj observadaj lokoj, bonvolu kontakti nin ĉe ihy_unbss@ihy.gsfc.nasa.gov.

Ni ankaŭ serĉas helpon kaj kontribuojn por la kreado de ĉi tiuj novaj observatorioj en pluraj evoluantaj nacioj. Se vi aŭ via organizo povas helpi nin trovi helpon por ĉi tiuj gravaj aferoj, bonvolu kontakti nin.



Unuaj paŝoj por partoprenado en IHJ

Se vi interesiĝas pri la IHJ kaj ŝatus ke ni informu vin pri niaj aferoj, stato, kaj ĝenerala IHJ informo, bonvolu membriĝi la IHJ e-poŝtan liston. Kiel membro de la listo, vi ricevos la IHJ bultenon kaj IHJ e-poŝtajn novaĵojn, kiuj informos vin pri la plej aktuala novaĵo!

Por aboni, malaboni, aŭ redakti viajn proprajn preferojn, bonvolu viziti la retpaĝon por la IHJ Informo Poŝta Listo ĉe:

http://ihy2007.org/mail_list.shtml

IHJ 2007

Se vi interesiĝas pri partoprenado en IHJ scienco, historio, aŭ edukaj aferoj, bonvolu tiel notu en la Datenbazon por IHJ Scienca Kunordigo. Oni povas uzi la datenbazon per la TTT ĉe:

<http://ihy2007.org/scd.shtml>

Per ĉi tiu datenbazo ni povos kontroli la aferojn kaj interesojn de niaj multaj partoprenantoj.

Ankaŭ vizitu ĉi tiujn retpaĝojn por aktuala informo pri la IHJ:

- IHJ Sekretariejo:
<http://ihy2007.org/contact.shtml>
- Unuiĝintaj Nacioj Baza Scienca Iniciato:
www.oosa.unvienna.org/SAP/bss/ihy2007/index.html

Kontaktaj detaloj



Unuiĝintaj Naciaj Baza Kosma Scienca Iniciato
Unuiĝintaj Naciaj Fakoj por Kosmaj Aferoj
P.O. Box 500, 1400 Wien, Aŭstrio
Telefono: +43-1-26060-4949
Fakso: +43-1-26060-5830
E-poŝto: oosa@unvienna.org
Reto: <http://www.oosa.unvienna.org/SAP/bss/ihy2007>

International Heliophysical Year Secretariat
American Geophysical Union
2000 Florida Ave., NW
Washington, DC 20009
Usono
Retadreso: <http://ihy2007.org>